# Lenino:
# Pri religio
# Du artikoloj

# Lenino

# Pri religio

## Du artikoloj

Monda Asembleo Socia (MAS)

Lenino: Pri religio
Du artikoloj
Socialismo kaj religio, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk;
Pri rilato de laborista partio al religio, trad. G. Demidjuk
redaktitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-96-0

# Enhavo

Socialismo kaj religio.................................................................7
Pri la rilato de laborista partio al religio..................................13

Klarigoj de la redaktinto..........................................................25

La broŝuro estas eldonita per la zorgoj de Komunista Frakcio de Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj de Tutsovetia Ateista Unio. Traduko el la rusa lingvo estas plenumita de k-doj M. Lapin kaj G. Demidjuk (Moskvo) kaj, laŭ komisio de Lingva Komisiono ĉe SEU, kontrolita de k-do N. Hohlov (Moskvo). Preslaboro estas plenumita de la presejo «I n t e r n a c i a» en M o s k v o

*(Kopio de la 2-a paĝo de la unua eldono)*

# Socialismo kaj religio

Publikigita la 3-an de decembro 1905 en la
ĵurnalo «Novaja Ĵiznja» – «Nova Vivo»,
n-ro 28, v. VII, p. 48-52.

La tuta moderna socio estas konstruita sur ekspluatado de la multnombra laborista klaso fare de la eta malplimulto de la ŝtatanaro, apartenanta al la klasoj de bienuloj kaj kapitalistoj. Tiu ĉi socio estas sklavposedula, ĉar la «liberaj» laboristoj, dum la tuta sia vivo laborantaj por la kapitalo, «havas rajton» nur je tiuj ekzistorimedoj, kiuj estas necesaj por vivtenado de la sklavoj, produktantaj la profiton, por firmigo kaj eternigo de la subkapitalisma sklavaro.

La ekonomia premego kontraŭ laboristoj nepre elvokas kaj naskas ĉiujn specojn de premego politika, de maldignigo socia, de krudigo kaj nebuligo de la spirita kaj morala vivo de la amasoj. Laboristoj povas konkeri por si pli aŭ malpli grandan politikan liberecon en la batalo por sia ekonomia liberigo, sed neniu libero senigos ilin de la mizero, senlaboreco kaj premego, ĝis estos renversita la potenco de la kapitalo. Religio estas unu el la specoj de spirita premego, subjuganta ĉie kaj ĉiuloke la popolajn amasojn prematajn per la eterna laboro por aliuloj, per mizero kaj soleco. La senforto de ekspluatataj klasoj en la batalo kontraŭ ekspluatistoj samtiel nepre naskas la kredon je pli bona postmorta vivo, kiel la senpoveco de sovaĝa homo en lia batalo kontraŭ la naturo naskas la kredon je dioj, diabloj, mirakloj k.s. Tiun, kiu dum la tuta vivo laboras kaj mizeras, la religio instruas pri humiliĝo kaj toleremo en la surtera vivo, konsolante per la espero je la ĉiela rekompenco. Kaj tiujn, kiuj vivas per fremda laboro, la religio instruas al la bonfarado dum la surtera vivo, proponante al ili tre malvaloran pravigon por la tuta ilia ekspluatista ekzistado kaj vendante laŭ konvena prezo biletojn por la enĉiela bonstato.

La religio estas veneno por la popolo.[1] La religio estas speco de spirita brando, en kiu la sklavoj de la kapitalo dronigas sian homecan aspekton, siajn aspirojn pri vivo almenaŭ iom inda je homo.

Sed la sklavo, konsciinta sian sklavecon kaj leviĝinta en la batalo por sia liberiĝo, jam duone ĉesas esti sklavo. La moderna konscia laboristo, edukita de grandskala fabrika industrio, klerigita de urba vivo, forĵetas

1 Jen lenina versio de la marksa formulo, laŭ kiu religio estas opio ne *por*, sed *de* la popolo. Laŭvorte: „Ĝi estas la opio de la popolo”. Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko, en: Karlo Markso: Kontribuaĵo … (librofina librolisto n-ro 43), p. 7.-vl

de si kun malŝato la religiajn antaŭjuĝojn, lasas la ĉielon je dispono de pastroj kaj burĝaj bigotoj, konkerante por si pli bonan vivon tie ĉi sur la tero.

La moderna proletaro grupiĝas sub la standardo de la socialismo, kiu altiras sciencon al la batalo kontraŭ la religia nebulo kaj liberigas la laboriston el la kredo je postmorta vivo per tio, ke ĝi firmigas lin al la vera batalo por la pli bona surtera vivo.

La religio devas esti deklarita privataĵo – per tiuj vortoj oni ordinare esprimas la rilaton de socialistoj al religio. Sed la signifon de tiuj ĉi vortoj necesas ĝuste difini, por ke ili povu elvoki neniajn miskomprenojn. Ni postulas, ke la religio estu privata afero rilate al la ŝtato, sed neniel ni povas konsideri la religion privata afero rilate al nia propra partio. La ŝtato maldevas zorgi pri la religio, la religiulaj asocioj maldevas esti ligitaj kun la ŝtata aŭtoritato. Ĉiu devas esti tute libera konfesante iun religion aŭ konfesante neniun, t.e. esti ateisto, kiel ordinare estas ĉiu socialisto. Neniaj diferencoj inter la civitanoj en iliaj rajtoj depende de iliaj religiaj kredoj estu allaseblaj. Eĉ la aludoj pri tiu aŭ alia konfesio de civitanoj en la oficialaj dokumentoj devas esti nepre nuligitaj. Devas esti neniu subvencio al la ŝtata eklezio, neniu subvencio el la ŝtataj monsumoj al la ekleziaj kaj religiulaj grupiĝoj, kiuj devas fariĝi tute liberaj unuiĝoj de civitanoj samkonfesiaj, sendependaj de la potenco. Nur la ĝisfina plenumo de tiuj ĉi postuloj povas finlikvidi tiun malhonoran kaj malbenitan pasintecon, kiam la eklezio estis en la servuta dependo de la ŝtato, kaj la rusaj civitanoj estis en la servuta dependo de la ŝtata eklezio, kiam ekzistis kaj estis aplikataj mezepokaj, inkviziciaj leĝoj (*ĝis nun restantaj en niaj krim-leĝaroj kaj -regularoj*), persekutantaj pro la kredo kaj malkredo, perfortantaj la homan konscion, ligantaj la ŝtatajn oficpostenojn kaj la ŝtatenspezojn al la distribuo de tiu aŭ alia ŝtateklezia ebriiga drinkaĵo. Absoluta diseco inter la eklezio kaj la ŝtato – jen estas la postulo, kiun prezentas la socialista proletaro al la moderna ŝtato kaj moderna eklezio.

La rusa revolucio devas efektivigi ĉi tiun postulon, kiel necesan elementon de politika libero. La rusa revolucio en ĉi rilato troviĝas en

precipe bonaj cirkonstancoj, ĉar la abomena burokrateco de la politike servuta aŭtokratio kaŭzis malkontenton, kontraŭstaremon kaj indignon eĉ en la pastrara medio, eĉ ĝin vekis nun la tondro kiu akompanis la falon de la malnova mezepoka sociordo en Rusio. Eĉ ĝi aliĝas al la postuloj de libero, protestas kontraŭ la burokrateco kaj la oficista jugo, kontraŭ la policista detektivismo altrudita al la «diservantoj». Ni socialistoj devas subteni ĉi tiun movadon, gvidante ĝis la fino la postulojn de la honestaj kaj sinceraj homoj el la pastraro, kaptante ilin per la vortoj pri libero, postulante de ili, ke ili absolute rompu ĉiujn rilatojn inter la religio kaj la polico. Aŭ vi estas sinceruloj, kaj tiam vi devas batali por la absoluta diseco inter la eklezio kaj la ŝtato, inter la lernejoj kaj la eklezio, por absoluta kaj senkondiĉa deklaro de la religio – privata afero. Aŭ vi ne akceptas ĉi tiujn konsekvencajn postulojn de la libero, – kaj tio signifas, ke vi dume estas ĉiam kaptitoj de la inkvizicio, ke vi dume ĉiam estas koruptitaj per la ŝtataj oficpostenoj kaj la ŝtatenspezoj, tio signifas ke vi ne kredas je spiritforto de via armilaro, vi daŭre akceptas la subaĉetaĵon de la potenco kaj pro tio la plenkonsciaj laboristoj de la tuta Rusio deklaras kontraŭ vi senindulgan militon.

Rilate al la partio de la socialista proletaro la religio ne estas privata afero. Nia partio estas unuiĝo de plenkonsciaj, antaŭenemaj batalantoj por la liberigo de la laborista klaso. Tiu unuiĝo ne povas kaj devas ne rilati indiferente al la senkonscieco, malklereco kaj superstiĉemo, kiel formoj de la religiaj kredoj. Ni postulas absolutan disecon inter la eklezio kaj la ŝtato, per la pure idea, kaj nur per idea armilaro, per nia gazetaro, per nia vorto. Sed ni fondis nian unuiĝon de «R.S.D.L.P.», interalie, por batali kontraŭ ĉiu religia stultigo de laboristoj. Por ni la idea batalo ne estas privata, sed ĝenerale partia, ĝenerale proletara afero.

Se estas tiel, kial do ni ne deklaras en nia programo, ke ni estas ateistoj? Kial ni ne malpermesas al la kristanoj kaj kredantoj aliĝi al nia partio?

Respondo al tiu ĉi demando devas klarigi tre gravan diferencon inter la burĝ-demokratia kaj social-demokratia starigo de la demando pri la religio.

Nia tuta programo estas bazita sur scienca kaj samtempe ĝuste materiisma mondkoncepto. La komentado de nia programo necese enhavas ankaŭ komentojn pri la vere historiaj kaj ekonomiaj radikoj de la religia nebulo. Nia propagando nepre entenas ankaŭ la propagandon de ateismo, la eldonadon de la respektiva scienca literaturo, kiun ĝis nun severe malpermesis kaj persekutis la aŭtokrati-servuta ŝtata aŭtoritato kaj kiu devas formi nun unu el la branĉoj de nia politika laboro. Ni kredeble devas nun sekvi la konsilon, kiun siatempe donis Engelso al la germanaj socialistoj: tradukado kaj amasa disvastigo de la kleriga kaj ateista franclingva literaturo de la 18-a jarcento.

Sed ni nenial devas deflankiĝi al la abstrakta, idealisma starigo de la religia problemo laŭ la racio, laŭ la eksterklasa batalo – al la starigo, ne malforte proponata flanko de la radikalaj demokratoj el la burĝaro. Estus burĝa limigiteco pensi, ke en la socio, bazita sur la senfina premego kaj krudigo de la laboristaj amasoj, oni povas pure per predikado forigi la religiajn antaŭjuĝojn. Estas burĝa limigiteco forgesi pri tio, ke premego de la religio al la homaro estas nur produkto kaj reflekto de la ekonomia premego ekzistanta interne de la socio. Per neniuj libroj kaj per neniu prediko oni povas klerigi la proletaron, se ĝin ne klerigus ĝia propra batalo kontraŭ la nigraj fortoj de la kapitalismo.

Unueco de tiu ĉi fakte revolucia batalo, kondukata de la premegata klaso por la kreado de paradizo sur la tero, estas por ni pli grava ol unueco de la opinioj de la proletaro pri paradizo en la ĉielo.

Jen kial ni ne deklaras kaj devas ne deklari en nia programo pri nia ateismo; jen kial ni ne malpermesas kaj devas ne malpermesi al la proletoj, konservintaj tiujn aŭ aliajn restaĵojn de malnovaj antaŭjuĝoj, proksimiĝon al nia partio. La sciencan mondkoncepton ni ĉiam predikos, batali kontraŭ la nekonsekvenco de iuj «kristanoj» por ni estas necese, sed tio tute ne signifas ke necesus meti la religian demandon sur la unuan lokon, kiu tute ne apartenas al ĝi, ke necesus permesi la diserigon de la fortoj en la efektive revolucia, ekonomia kaj politika batalo pro triagrade gravaj aŭ falsaj opinioj rapide perdantaj ĉian politikan signifon, rapide ĵetatajn en la kloakon dum la procedo mem de la eko-

nomia evoluado. La reakcia burĝaro ĉie zorgis kaj ĉe ni nun komencas zorgi, ke ekflamu la religia malamikeco, ke deflankiĝu la atento de la amasoj de efektive gravaj kaj fundamentaj ekonomiaj kaj politikaj problemoj, kiujn nun praktike solvas la unuiĝinta en sia revolucia batalo tutrusia proletaro. Tiu ĉi reakcia politiko de la diserigo de proletaraj fortoj, hodiaŭ sin montranta ĉefe en la pogromaj masakroj, farataj de carismaj subaĉetitoj, morgaŭ eble eltrovos pli subtilajn reformojn.

Ĉiuokaze, ni kontraŭstarigu al ĝi trankvilan, persistan kaj paciencan, senigitan de incito pro duagrade gravaj malkonsentoj, predikon de la proletara solidareco kaj de la scienca mondpercepto.

La revolucia proletaro atingos tion, ke la religio fariĝu efektive privata afero por la ŝtato. Kaj en tiu ĉi politika reĝimo, purigita de la mezepoka ŝimo, la proletaro kondukos vastan, malkaŝan batalon por forigi la ekonomian sklavecon, la veran fonton de la religia trompo por la homaro.

# Pri la rilato de laborista partio al religio

Presita en la ĵurnalo «Proletarij» (Proleto),

la 26-an de majo 1909.

La parolado de deputito Surkov en la Regna Dumo[2] dum la diskutado pri buĝetprojekto de sinodo kaj la disputoj en nia Duma frakcio dum la diskutado pri projekto de tiu ĉi parolado, ĉi malsupre de ni presotaj, – iniciatis ekstreme gravan kaj ĝuste nuntempe aktualan problemon. Intereso por ĉio ligita al la religio sendube kaptis nun vastajn rondojn de la «socio» kaj penetris inter la vicojn de la intelektularo, proksima al la laborista movado, kaj ankaŭ certajn laboristajn rondojn. La socialdemokrataro estas nepre devigita fari deklaron per prezento de sia rilato al religio.

La socialdemokrataro konstruas tutan sian mondkoncepton sur scienca socialismo, t.e. marksismo. Filozofia bazo de la marksismo, kiel kelkfoje deklaris Markso kaj ankaŭ Engelso, estas la dialektika materiismo, plene akceptinta la historiajn tradiciojn de la materiismo de la 18-a jarcento en Francio kaj de Fojerbaĥo (1-a duono de la 19-a jarcento) en Germanio, de la materiismo absolute ateista, senhezite malamika al ajna religio. Ni rememorigu, ke la tuta «Kontraŭ-Duringo»[3] de Engelso, en manuskripto tralegita de Markso, akuzas la materiiston kaj ateiston Duringo pri la malkompleteco de lia materiismo, pri la allaso de rampejoj por religio kaj religia filozofio. Ni rememorigu, ke en sia verko pri Ludoviko Fojerbaĥo[4] Engelso riproĉas lin pro tio, ke li batalis kontraŭ la religio ne por neniigi ĝin, sed por novigi, por verki novan, «pli altan» religion ktp. La religio estas opio por la popolo,[5] – tiu frazo de Markso estas la fundamenta ŝtono de la tuta mondkoncepto de la marksismo

---

2 Nomo de la rusa parlamento. -vl

3 „Kontraŭ-Duringo”, germane: „*Anti-Dühring*”, estas kutima mallongigo de la verko *Friedrich Engels: Herrn Eugen Dührings Umwälzung der Wissenschaft* [Frederiko Engelso: La revolucio de la scienco fare de s-ro Eŭgeno Duringo]. Eŭgeno Duringo, germ. Eugen Dühring [ójgen djúring] (1833-1921), germana filozofo kaj ekonomikisto, etburĝa ideologo. La filozofiaj konceptoj de Duringo estis eklektika miksaĵo de pozitivismo, metafizika materiismo kaj idealismo. La konceptoj de Duringo, subtenataj de parto de la germana socialdemokrataro, estis kritikataj de Engelso en la supre menciita verko. Lenino en sia „Materiismo kaj empiriokriticismo” kaj en serio da aliaj verkoj kritikis la duringan eklektikismon. -vl laŭ -lŝr

4 Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio (librofina librolisto n-ro 56). -vl

5 La formulo de Markso estas fakte „*de* la popolo”, ne „*por* la popolo”. Vd p.8, pn 1. -vl

rilate la problemon de religio. Ĉiujn modernajn religiojn kaj ekleziojn, ĉiujn kaj ĉiajn religiajn organizaĵojn la marksismo rigardas ĉiam, kiel organojn de burĝa reakcio, servantajn por defendo de la ekspluatado kaj stultigo de la laborista klaso.

Kaj en la sama tempo, tamen, Engelso ne nur unufoje malaprobis la homojn, kiuj deziris esti «pli maldekstraj» kaj «pli revoluciaj» ol la socialdemokrataro, pro iliaj provoj enigi en la programon de laborista partio rektan agnoskon de ateismo en la senco de militdeklaro kontraŭ religio. En la jaro 1874, parolante pri la fama manifesto de la fuĝintoj de la Pariza Komunumo, de adeptoj de Ludoviko Blankio[6], loĝintaj kiel elmigrintoj en Londono, Engelso traktas kiel malsaĝaĵon ilian brueman deklaron de milito kontraŭ religio, dirante, ke tia militdeklaro estas la plej bona rimedo por plivigligi la intereson al religio kaj malhelpi la efektivan formortadon de religio. Engelso konsideras kulpo de la blankianoj ilian nescipovon kompreni, ke nur la klasa batalo de laboristaj amasoj, ĉiuflanke entirante la plej vastajn tavolojn de la proletaro en la konscian kaj revolucian socian *praktikadon,* kapablas efektive liberigi la premegatajn amasojn el sub la jugo de religio, dum nomi politika tasko de laborista partio la deklaron de milito kontraŭ religio estas anarĥiisma frazo. Kaj en la jaro 1877, en sia „Kontraŭ-Duringo”, senindulge kritikegante la plej malgrandajn cedojn de la filozofo Duringo al idealismo kaj religio, Engelso ne malpli decide malaprobas la kvazaŭ revolucian ideon de Duringo pri la malpermeso de religio en socialisma socio. Deklari similan militon kontraŭ religio – diras Engelso – signifas «superi Bismarkon[7] mem», t.e. ripeti la malsaĝaĵon de la bismarka batalo

6 France: Louis Auguste Blanqui [luí ogíst blankí] (1805-1881, franca revoluciulo: socialista teoriulo kaj politikisto, partoprenis en la laboristaj manifestacioj de 1848 kaj en la Pariza Komunumo. Li inspiris la revolucian sindikatismon (blankiismon). -vl

7 Bismarko (germane: Otto Eduard Leopold Bismarck [óto édŭart léopolt bísmark] (1815-1898), ŝtata aganto kaj diplomato de Prusio kaj Germanio. Lia ĉefa celo estis unuigi la etajn disigitajn germanajn ŝtatojn regante unuecan Germanion (ekskludante Aŭstrion) sub hegemonio de la junkra Prusio. En 1971 li ekokupis la postenon de kanceliero de la

kontraŭ la klerikaro (la fama «kulturbatalo», Kulturkampf, t.e. la batalo de Bismarko post la jaro 1870 kontraŭ la germana partio de katolikoj, partio de la «centro», per policaj persekutoj kontraŭ la katolikismo). Per tia batalo Bismarko nur *plifirmigis* la militantan klerikismon de katolikoj, nur malhelpis la aferon de efektiva kulturo, ĉar li ŝovis sur la unuan nivelon la religiajn dividojn anstataŭ la dividojn politikajn, li forlogis la atenton de kelkaj tavoloj de la laborista klaso kaj [social]demokrataro al la flanko de la plej supraĵa kaj burĝece-mensoga kontraŭklerikismo, anstataŭ [ke ili atentu] la necesajn taskojn de klasa kaj revolucia batalo. Akuzante Duringon, kiu deziris esti ultrarevolucia, pri lia deziro ripeti aliforme la saman malsaĝaĵon de Bismarko, Engelso postulis de la laborista partio la scipovon pacience labori por la organizado kaj klerigado de la proletaro, kondukantaj al formortado de religio, sed ne la entreprenadon de politika milito kontraŭ religio. Tiu ĉi vidpunkto eniĝis en la karnon kaj sangon de la germana socialdemokrataro, kiu ekzemple esprimis sian opinion pri allaso de libero por jezuitoj, por ilia enlaso en Germanion, por neniigo de ĉiaj rimedoj de polica batalo kontraŭ tiu aŭ alia religio. La «deklaro de religio privata afero» – tiu fama punkto de la Erfurta Programo (de la jaro 1891)[8] fiksis la montritan politikan taktikon de la socialdemokrataro.

Tiu taktiko sukcesis jam nun fariĝi rutineca, sukcesis naski novan fuŝadon de la marksismo en la inversa flanko, en la flanko de oportunismo. Oni komencis trakti la tezon de la Erfurta Programo tiusence, ke ni, socialdemokratoj, nia partio konsideras la religion privata afero, ke por ni, kiel socialdemokratoj, por ni kiel partio, la religio estas privata afero. Ne komencante senperan polemikon kontraŭ tiu ĉi oportunisma

Germana Imperio kaj dum 20 jaroj estris la tutan eksteran kaj internan politikon de Germanio en la interesoj de la junkroj kaj samtempe provis garantii aliancon de la junkraro kun la grandburĝaro. En 1878 li akceptigis esceptan leĝon kontraŭ la socialistoj, sed ĉar lia provo per tiu leĝo sufoki la laboristan movadon fiaskis, li enkondukis leĝojn pri deviga asekuro por kelkaj kategorioj de laboristoj. Li demisiis en 1890.

8 Erfurta Programo – la programo de la germana socialdemokrataro, konfirmita dum la partia kongreso en Erfurto, en la jaro 1891.

koncepto, Engelso ĉirkaŭ la jaro 1890 konsideris necesa decide kontraŭbatali ĝin ne en la politika, sed en la pozitiva formo. Nome Engelso faris tion en la formo de deklaro, intence de li substrekita, ke la socialdemokrataro konsideras religion privata afero *rilate al la ŝtato*, sed neniel rilate al si, nek rilate al la marksismo, nek rilate al la laborista partio.

Tia estas la ekstera historio pri la deklaroj de Markso kaj Engelso rilate la problemon de religio. Por homoj nur supraĵe rilatantaj al la marksismo, por homoj ne scipovantaj aŭ ne dezirantaj pensi, tiu ĉi historio estas iu bulo el sensencaj kontraŭdiroj kaj ŝanceladoj de la marksismo: ia, tieldire, kaĉo el «konsekvenca» ateismo kaj «favoraĵoj» al religio, iu «senprincipa» ŝancelado inter rr-revolucia milito kontraŭ dio kaj malkuraĝa deziro «adapti sin» al dikredantaj laboristoj, timo forpeli ilin de si ktp ktp. En la literaturo de anarĥiaj frazistoj oni povas trovi multajn ataketojn similspecajn kontraŭ la marksismo.

Sed kiu kapablas kiom ajn serioze rilati al la marksismo, pripensi ĝiajn filozofiajn fundamentojn kaj la sperton de la internacia socialdemokrataro, tiu facile ekvidos, ke la taktiko de la marksismo rilate al religio estas profunde konsekvenca kaj pripensita de Markso kaj Engelso, ke tio, kion diletantoj kaj malkleruloj konsideras ŝanceladoj, estas rekta kaj neevitebla konkludo el la dialektika materiismo. Estus granda eraro opinii, ke la ŝajna «moderneco» de marksismo rilate al religio estas klarigebla per la tiel nomataj «taktikaj» konsideroj en la senco de la deziro «ne fortimigi» ktp. Kontraŭe, la politika linio de la marksismo ankaŭ en tiu problemo estas nedisŝireble ligita al ĝiaj filozofiaj fundamentoj.

Marksismo estas materiismo. Kiel tia, ĝi estas same senindulge malamika al la religio, kiel la materiismo de la enciklopediistoj de la 18-a jarcento[9] aŭ la materiismo de Fojerbaĥo. Tio estas senduba. Sed la dialektika materiismo de Markso kaj Engelso iras plien ol la enciklopediistoj kaj Fojerbaĥo, aplikante la materiisman filozofion al la fako de

9 Enciklopediistoj – reprezentantoj de franca radikala burĝaro de la 18-a jarcento, la aŭtoroj de la tiel nomata «Enciklopedio de sciencoj, arto kaj metioj» – predikis ateismon kaj materiismon.

historio, al la fako de sociaj sciencoj. Ni devas batali kontraŭ religio. Tio estas la aboco de la *tuta* materiismo kaj, sekve, de la marksismo. Sed marksismo ne estas materiismo haltinta ĉe la aboco. Marksismo iras plien. Ĝi diras: necesas *scipovi* batali kontraŭ religio, kaj por tio necesas *materiisme* klarigi la fonton de kredo kaj de religio ĉe la amasoj.

Oni devas ne limigi la batalon kontraŭ religio per abstrakte-ideologia prediko, oni ne povas ĝin fari tia prediko, necesas tiun batalon ligi kun la konkreta praktiko de la klasa movado, direktita al forigo de la sociaj radikoj de religio. Kial konserviĝas religio inter la neprogresintaj tavoloj de la urba proletaro, en la vastaj amasoj de la duonproletaro, kaj ankaŭ en la amaso de la kamparanaro? Pro la malklero de la popolo – respondas burĝa progresemulo, radikala aŭ burĝa materiisto. Sekve, for la religion, vivu la ateismo, nia plej ĉefa tasko estas disvastigo de la ateistaj konceptoj. Marksano diras: malvere. Tia koncepto estas supraĵa, burĝelimigita kulturecismo. Tia koncepto ne sufiĉe profunde, ne materiisme, sed idealisme klarigas la radikojn de religio.

En la modernaj kapitalismaj landoj tiuj ĉi radikoj estas ĉefe *sociaj*. La socia premegateco de la laborulaj amasoj, ilia ŝajne plena senhelpo antaŭ la blindaj fortoj de la kapitalismo, kiu kaŭzas por la ordinaraj laboruloj ĉiutage kaj ĉiuhore miloble pli multe da plej teruraj suferoj, da plej sovaĝaj turmentoj, ol ĉiuj eksterordinaraj okazintaĵoj kiel militoj, tertremoj ktp, – jen kio estas la plej profunda moderna radiko de religio. «La timo kreis diojn». La timo antaŭ la blinda forto de la kapitalo, blinda, ĉar ĝi ne povas esti antaŭvidita de la popolaj amasoj, – kiu sur ĉiu vivpaŝo de proleto kaj de eta posedulo minacas al li alporti kaj alportas «subitan», «neatenditan», «hazardan» bankrotiĝon, pereon, mizeriĝon, prostituiĝon, promalsatan morton, – jen estas tiu *radiko* de la moderna religio, kiun antaŭ ĉio kaj pleje devas konsideri materiisto, se li ne deziras resti materiisto de la prepara lerneja klaso. Neniu kleriga libreto forigos religion el inter la amasoj premegataj de la kapitalismo, dependaj de la blindaj detruaj fortoj de la kapitalismo, ĝis tiuj ĉi amasoj mem ellernos unuigite, organizite, plane, konscie batali kontraŭ tiu ĉi *radiko* de la religio, kontraŭ la *potenco de la kapitalo* en ĉiuj formoj.

Do, ĉu sekvas el tio, ke la kleriga libro kontraŭ la religio estas malutila aŭ superflua? Ne, el tio sekvas, ke ateista propagando de la socialdemokrataro devas esti *subigita* al ĝia fundamenta tasko: al la disvolvado de la klasa batalo de la ekspluatataj amasoj kontraŭ la ekspluatantoj.

Homo, kiu ne estas pripensinta la fundamentojn de la dialektika materiismo, t.e. filozofio de Markso kaj Engelso, povas ne kompreni (aŭ, almenaŭ, ne tuj kompreni) tiun ĉi tezon. Kiel do? Subigi la idean propagandon, predikadon de konataj ideoj, batalon kontraŭ tiu malamiko de kulturo kaj progreso, kiu ekzistas dum jarmiloj (t.e. kontraŭ la religio), – subigi al la klasbatalo, t.e. al batalo por difinitaj praktikaj celoj en la ekonomia kaj politika regiono?

Simila kontraŭdiro apartenas al la ordinare oftaj [«argumentoj»] direktitaj kontraŭ la marksismo kaj kiuj atestas pri la plena nekompreno de la marksa dialektiko. La spito de la senco, konfuzanta tiujn, kiuj simile kontraŭdiras, estas la viva sencospito de la funkcianta vivo, t.e. la dialektika, ne la vorta, ne la elpensita sencospito. Dividi per absoluta, netransirebla linio la teorian propagandon de ateismo, t.e. detruadon de religiaj kredoj ĉe kelkaj tavoloj de la proletaro, kaj la sukceson, pason, cirkonstancojn de la klasbatalo de tiuj ĉi tavoloj – tio signifas rezoni nedialekte, transformi en absolutan limon tion, kio estas movebla, relativa limo, tio signifas perforte disŝiri tion, kio estas neŝireble ligita kun la vivrealo. Ni montru ekzemplon. La proletaro de iu regiono kaj de iu industribranĉo dividiĝas, ni supozu, je la avangarda tavolo de sufiĉe konsciaj socialdemokratoj, kiuj estas, kompreneble, ateistoj kaj je la nesufiĉe progresintaj, ligitaj kun vilaĝo kaj kun kamparanaro, laboristoj, kiuj kredas dion, vizitas preĝejon aŭ eĉ estas sub la senpera influo de la loka pastro, fondanta, ekzemple, kristanan laboristan union. Ni supozu, plue, ke ekonomia batalo en tiu regiono kondukis al striko. Marksano devas meti la sukceson de la strikmovado sur la unuan nivelon, decide kontraŭagi la dividon de la laboristoj en tiu batalo je ateistoj kaj kristanoj, decide batali kontraŭ tia divido. Ateista prediko en tiaj kondiĉoj povus fariĝi superflua kaj ankaŭ malutila – ne el la vidpunkto de filistraj konsideroj pri nefortimigo de la malprogresintaj tavoloj, pri perdo de la

mandato ĉe la elektoj ktp, sed el la vidpunkto de la vera progreso de la klasbatalo, kiu en la cirkonstancoj de la moderna kapitalisma socio centoble pli bone kondukos kristanajn laboristojn al la socialdemokrat-aro kaj al la ateismo, ol la nuda ateista prediko. Predikanto de ateismo en tiu momento kaj en tiu medio estus aginta profite al la pastro kaj pastroj, kiuj nenion alian tiom deziras kiom anstataŭigi la dividon de la laboristoj laŭ partopreno en la striko per divido laŭ la konfesio. Anarĥi-isto, kiu propagandas nepran militon kontraŭ dio, efektive nur helpus al la pastroj kaj al la burĝaro (kiel anarĥiistoj ankaŭ ĉiam *efektive* helpas al la burĝaro). Marksano devas esti materiisto, t.e. malamiko de religio, sed materiisto dialektika, t.e. metanta la batalon kontraŭ religio ne abstrakte, ne sur la grundon de abstrakta, nur teoria, stabilforma prediko, sed konkrete, sur la grundon de klasbatalo, kiu okazas *en la realo* kaj edukas la amasojn plej multe kaj plej bone. Marksano devas scipovi konsideri la tutan konkretan medion, ĉiam trovi limon inter anarĥiismo kaj oportunismo (tiu ĉi limo estas relativa, moviĝema, ŝanĝiĝema, sed ĝi ekzistas), enfali nek en la abstraktan, pervortan, reale malplenan «revo-luciismon» de anarĥiisto, nek en la filistrecon kaj oportunismon de etburĝo aŭ de liberala intelektulo, kiu timetas batalon kontraŭ religio, forgesas pri tiu ĉi sia tasko, interpaciĝas kun kredo je dio, estas gvidata ne de la interesoj de la klasbatalo, sed de la malgrandeca, etskala pri-kalkulo; ne ofendi, ne forpuŝi, ne timigi, per la saĝega regulo: «vivu kaj lasu vivi al aliuloj» ktp ktp.

El la montrita vidpunkto necesas solvi ĉiujn detalajn problemojn, kiuj koncernas la rilaton de socialdemokrato al religio. Ekzemple, ofte metiĝas la demando, ĉu pastro povas esti membro de socialdemokrata partio, kaj ordinare oni respondas al tiu demando pozitive, sen iaj rezer-voj, pravigante sin per la sperto de eŭropaj socialdemokrataj partioj. Sed tiu ĉi sperto estas naskita ne nur per aplikado de la marksisma doktrino al la laborista movado, sed ankaŭ per la apartaj historiaj cirkonstancoj de la Okcidento, kiuj forestas en Rusio (ni diros pli malsupre pri tiuj cir-konstancoj), sekve la absoluta pozitiva respondo estus tie ĉi malĝusta. Oni ne povas unufoje por ĉiam kaj por ĉiuj cirkonstancoj deklari, ke pastroj povas esti membroj de socialdemokrata partio, sed oni ankaŭ ne

povas unufoje por ĉiam starigi la inversan regulon. Se pastro venas al ni por kuna politika laboro kaj plenumas honeste la partian laboron, ne kontraŭagante la programon de la partio, do ni povas akcepti lin en socialdemokratajn vicojn, ĉar la kontraŭdiroj de spirito kaj fundamentoj de nia programo al la religiaj konvinkoj de la pastro en tiaj kondiĉoj povus resti rilatantaj nur lin, resti nur lia persona kontraŭsenco, sed ekzameni siajn membrojn rilate la foreston de kontraŭsenco inter iliaj konceptoj kaj la partiprogramo la politika organizaĵo ne povas. Kompreneble, simila okazo povus esti malofta escepto eĉ en Eŭropo, kaj en Rusio ĝi estus jam tute malmulte probabla. Kaj se, ekzemple, pastro venus al socialdemokrata partio kaj en tiu partio komencus, kiel sian ĉefan kaj preskaŭ solan laboron, aktive prediki religiajn konceptojn, la partio nepre devus eksigi lin el sia medio. Ni devas ne nur allasi, sed ankaŭ pleje allogi en socialdemokratan partion ĉiujn laboristojn, kiuj konservas la kredon je dio, ni estas absolute kontraŭ la plej malgranda ofendo de iliaj religiaj konvinkoj, sed ni allogas ilin por eduki ilin en la spirito de nia programo, sed ne por la aktiva batalo kontraŭ ĝi. Ni allasas *interne* de la partio liberon de opinioj, sed en certaj limoj, difinitaj per libero de grupiĝo: ni ne estas devigataj iri brak-en-brake kun la aktivaj predikantoj de konceptoj malakceptataj de la partia plimulto.

Alia ekzemplo: ĉu oni povus en ĉiuj kondiĉoj egale kulpigi membrojn de socialdemokrata partio pro la deklaro: «socialismo estas nia religio» kaj pro la predikado de konceptoj konformaj al la simila deklaro? Ne. Dekliniĝo de la marksismo (kaj sekve, ankaŭ de la socialismo) tie estas senduba, sed la signifo de tiu ĉi forlaso, ĝia, tieldire, specifa pezo povas esti diversa en diversaj cirkonstancoj. Estas unu afero, se agitanto aŭ homo elpaŝanta antaŭ la laborista amaso parolas tiel por esti pli komprenata, por komenci la paroladon, por pli reale substreki siajn konceptojn per terminoj plej kutimaj al la neklerigita amaso. Alia afero estas, se verkisto komencas prediki «dikonstruadon» aŭ dikonstruan socialismon (ekzemple, en la spirito de niaj Lunaĉarski kaj Kompanio). Kiomgrade en la unua okazo la kulpigo povus esti alkroĉiĝo aŭ eĉ neĝustaloka malhelpo al la libereco de agitanto, al la libereco de «pedagogia» efiko, tiomgrade en la dua okazo la partia kondamno estas necesa

kaj nepra. – La tezo: «socialismo estas religio» por iuj estas transirformo de religio al socialismo, por aliiuj – de socialismo al religio.

Ni transiru nun al la kondiĉoj, kiuj en la Okcidento naskis la oportunisman traktadon de la tezo: «deklaro de religio privata afero». Certe, tie ĉi estas la influo de ĝeneralaj kaŭzoj, naskantaj la oportunismon ĝenerale, kiel oferadon de esencaj interesoj de la laborista movado al la minutaj profitoj. La partio de la proletaro postulas, ke la ŝtato deklaru religion privata afero, neniel konsiderante «privata afero» la problemon de batalo kontraŭ la opio por[10] la popolo, batalo kontraŭ religiaj superstiĉoj ktp. Oportunistoj puŝas la aferon tiamaniere, kvazaŭ *socialdemokrata* partio estus *konsiderinta* religion privata afero!

Sed krom la ordinara oportunisma fuŝado (tute ne klarigita en la disputoj, okazigitaj de nia Duma frakcio ĉe la diskutado de la deklaro pri religio), ekzistas apartaj historiaj kondiĉoj, aperigintaj la modernan, se oni povas tiel esprimi, troan, indiferentecon de eŭropaj socialdemokratoj al la problemo de religio. Ili estas kondiĉoj duspecaj. Unue, la tasko de batalo kontraŭ religio estas historia tasko de revolucia burĝaro, kaj en la Okcidento tiun ĉi taskon en konsiderinda grado plenumis (aŭ estis plenumanta) la burĝa demokratio en la epoko de *siaj* revolucioj aŭ de siaj atakoj kontraŭ la feŭdismo kaj mezepokaĵoj. En Francio kaj ankaŭ en Germanio ekzistas tradicio de burĝa milito kontraŭ religio, komencita longe antaŭ la socialismo (enciklopediistoj, Fojerbaĥo). En Rusio konforme al la kondiĉoj de nia burĝe demokratia revolucio, ankaŭ tiu tasko preskaŭ plene falas sur la ŝultrojn de la laborista klaso. La etburĝa (popolana) demokratio faris ĉe ni tiurilate ne tro multe (kiel opinias la nove aperintaj nigrocentulaj[11] kadetoj[12] aŭ kadetaj nigrocentuloj el «Veĥi»[13]), sed *tro malmulte* kompare kun Eŭropo.

---

10 Vd p. 8, pn 1 kaj p. 14, pn 4. -vl

11 Nigrocentuloj estis nomataj en Rusio reprezentantoj de absolutisma monarĥista partio.

12 Kadetoj – membroj de konstituci-demokratia (burĝa) partio en Rusio.

13 «Veĥi» – artikolaro de la pentantaj intelektuloj, post «revolucia haladzo» de la jaroj 1905-1907, kiuj antaŭe estis marksanoj: Bulgakov, Berdjaev,

Aliflanke, la tradicio de burĝa milito kontraŭ religio sukcesis krei en Eŭropo specife burĝan fuŝadon de ĉi milito per la anarĥiismo, kiu staras, kiel tion jam delonge kaj multfoje marksanoj estis klarigantaj, sur la grundo de burĝa mondpercepto malgraŭ la tuta «furiozo» de siaj atakoj kontraŭ la burĝaro. Anarĥiistoj kaj blankianoj en la latinidaj landoj, Most (kiu estis, interalie, lerninto de Duringo) kaj Kompanio en Germanio, anarĥiistoj dum la 1880-aj jaroj en Aŭstrio puŝis ĝisekstreme la revolucian frazon en la batalo kontraŭ religio. Ne estas mirige, ke eŭropaj socialdemokratoj tro uzas la bastonon, uzitan de anarĥiistoj. Tio estas komparebla kaj en certa grado laŭleĝa, sed forgesi pri la apartaj historiaj kondiĉoj de la Okcidento ne decas al ni, rusaj socialdemokratoj.

Due, en la Okcidento *post* la finiĝo de naciaj burĝaj revolucioj, *post* la enkonduko de pli aŭ malpli plena libero de konfesio, la problemo de demokratia batalo kontraŭ religio estis jam tiomgrade historie forpuŝita en la duan nivelon, per la batalo de burĝa demokratio kontraŭ socialismo, ke burĝaj registaroj *konscie* provis forlogi la atenton de la amasoj for de la socialismo per organizado de *kvazaŭliberala* «militiro» kontraŭ la klerikismo. Tian karakteron havis la «*Kulturkampf*» en Germanio, kaj ankaŭ la batalo kontraŭ klerikismo de burĝaj respublikanoj en Francio. La burĝa kontraŭklerikismo, kiel rimedo por logi la atenton de la laboristaj amasoj for de la socialismo, – jen kio en la Okcidento antaŭis la disvastigadon de la moderna «indiferenteco» al la batalo kontraŭ religio inter socialdemokratoj. Kaj ree tio estas komprenebla kaj laŭleĝa, ĉar al la burĝa kaj bismark-ana kontraŭklerikismo socialdemokratoj devis kontraŭmeti ĝuste la subordigon de la batalo kontraŭ religio al la batalo por socialismo.

En Rusio la kondiĉoj estas tute aliaj. La proletaro estas gvidanto de nia burĝe demokratia revolucio. La partio de la proletaro devas esti idea gvidanto en la batalo kontraŭ ĉia mezepokaĵo, tiunombre ankaŭ kontraŭ la malnova oficiala religio kaj kontraŭ ĉiaj provoj novigi ĝin aŭ bazi ĝin laŭnove aŭ alimaniere ktp. Tial, se Engelso relative mole korektis la oportunismon de germanaj socialdemokratoj, kiuj substituis la postulon

---

P. Struve k.a.

de laborista partio, ke la *ŝtato* deklaru religion privata afero, per la deklaro de religio privata afero por socialdemokratoj mem kaj por socialdemokrata partio, – do estas komprenebla, ke imitado de tiu ĉi germana fuŝado, farata de rusaj oportunistoj, trovus centoble pli akran kondamnon de Engelso.

Deklarinte de sur la Duma tribuno, ke religio estas opio por la popolo, nia frakcio agis tute ĝuste kaj kreis tiamaniere precedencon, kiu devas esti bazo por ĉiuj deklaroj de rusaj socialdemokratoj pri la problemo de religio. Ĉu necesis iri pluen, disvolvante ankoraŭ pli detale la ateismajn konkludojn? Ni opinias, ke ne. Tio povus minaci per trograndigo de la batalo kontraŭ la religio flanke de la politika partio de la proletaro; tio povus konduki al forviŝo de la limo inter la burĝa kaj la socialisma batalo kontraŭ religio. La unua ago, kiun devus plenumi la socialdemokrata frakcio en la nigracentula Dumo – estis honore plenumita.

La dua – kaj eble la ĉefaĵo por socialdemokratoj – la klarigado pri la klasa rolo de eklezio kaj de ekleziularo en subtenado de la nigrocentula registaro kaj de la burĝaro en ilia batalo kontraŭ la laborista klaso – estis same honore plenumita. Certe, pri tiu temo oni povas ankoraŭ diri tre multon kaj la sekvantaj deklaroj de socialdemokratoj trovos ion por kompletigi la paroladon de k-do Surkov, sed tamen lia parolado estis bonega kaj ĝia disvastigo per ĉiuj partiaj organizaĵoj estas rekta devo de nia partio.

Trie – necesis plenatente klarigi la ĝustan sencon de la tezo, tiom ofte fuŝata de germanaj oportunistoj: «deklaro de religio privata afero». Tion, bedaŭrinde, k-do Surkov ne faris. Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar en la antaŭa agado la frakcio jam allasis en tiu demando eraron de k-do Belousov, notitan de «Proletarij». La diskutoj en la frakcio montras, ke la disputo pri ateismo ŝirmis de ĝi la demandon pri ĝusta prezento de la fama postulo pri deklaro de religio privata afero. Ni ne kulpigos sole k-don Surkov pro tiu ĉi eraro de la tuta frakcio. Pli multe. Ni konfesas rekte, ke tie estas eraro de la tuta partio, nesufiĉe klariginta tiun ĉi problemon, nesufiĉe preparinta en la konscio de socialdemokratoj la

signifon de la Erfurta rimarko adresita al germanaj oportunistoj. La diskutoj en la frakcio montras, ke ĝi estis ĝuste la neklara kompreno de la problemo, sed neniel la nedeziro konsideri la instruon de Markso, kaj ni estas certaj, ke la eraro estos korektita en la sekvontaj deklaroj de la frakcio.

Ĝenerale kaj komplete ni ripetu ke la parolado de k-do Surkov estas bonega kaj devas esti disvastigata de ĉiuj organizaĵoj. Per pridiskuto de tiu ĉi parolado la frakcio pruvis plene konsciencan plenumadon de sia socialdemokrata devo. Restas esprimi la deziron, ke korenspondaĵoj pri la diskutoj interne de la frakcio pli ofte aperu en la partia gazetaro por proksimigi la frakcion al la partio, por konatigi al la partio la malfacilan internan laboron plenumatan de la frakcio, por starigo de idea unueco en la agado de la partio kaj frakcio.

# Klarigoj de la redaktinto

## *Pri la kialo de tiu ĉi noveldono*

Tiuj ĉi du leninaj tekstoj el la jaroj 1905 kaj 1909 pri religio kaj la rilato de komunistoj (tie ankoraŭ nomataj socialdemokratoj) al ĝi, kvankam ili estas respondoj al tiam aktualaj demandoj en la tiama carisma Ruslando, tamen pritraktas problemon ankoraŭ daŭre aktualan, nome, kian gravecon havas por ateistoj agadi kontraŭ religioj, ĉu tiu agado estas prioritata, aŭ ĉu ĝi estas subordigenda al la agado por tutsociaj ŝanĝoj kiuj siavice superfluigos religion.

Ĉu socialisma revolucio vere superfluigas religion, kreante kondiĉojn, en kiuj religioj formortas, ĉar mankas al ili la ekonomia bazo? Povas esti, ke niaj klasikuloj iom eraris pri la tenaca vivo de religioj, kiel ili eble ankaŭ eraris pri la malapero de naciismo.

Tiusence la tekstoj povas esti elirpunkto de diskutoj kun la intertempe pli ol jarcenton longa sperto pri religio en la diversaj popoloj, nelaste pri la Teologio de Liberigo, de kiu kelkaj reprezentantoj eĉ konsideras Markson sia teologo.[14]

## *Ŝanĝoj*

Ĉar la tradukoj de antaŭ pli ol cent jaroj havas siajn apartecojn, kiuj bezonis ioman prilaboradon, unuavice por faciligi la legadon al nuntempa leganto kaj duavice por konformi la terminaron kaj ceterajn esprimojn al la intertempe jam pli abunda marksisma literaturo en nia lingvo, mi faris ŝanĝojn en la teksto, kies principojn mi klarigu pri la sekvaj ekzemploj.

– elizio de la artikolo, ekz-e: *l'problemo* (eĉ kontraŭfundamente rekte ligita kun la sekva vorto), en nepoezia teksto -> *la problemo*

– ekspluatado de la multenombra laborista klaso flanke de -> … fare de

---

14 Vd Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? en: Werner Seppmann: Laboro kaj dialektiko (ktp), (librofina librolisto n-ro 29), p. 64-79.

– komplika frazstrukturo: „liberaj, sendependaj de la potenco unuiĝoj de civitanoj – samkonfesianoj” -> liberaj unuiĝoj de civitanoj samkonfesiaj, sendependaj de la potenco.

– socialdemokratio -> socialdemokrataro

- ĝin vekigis nun la tondro -> ĝin vekis

– bazita per scienca … mondpercepto -> bazita sur scienca …

– paradizo sur la ĉielo -> … en la ĉielo

– Pariza Komuno -> Pariza Komunumo

– anarkisma -> anarĥiisma

– klerikaloj -> klerikaro

– dialektiko de Marx -> marksa dialektiko

– aliuj -> aliiuj (aliuloj)

– s.-d. -> socialdemokrato(j), socialdemokrata(j)

– estis deklarantaj -> deklaris [kiam tiu tempa precizo superfluas]

– ne unu fojon estis malaprobinta -> ne nur unu fojon malaprobis („ne unu fojon” povus signifi „eĉ ne unu fojon”, do la malon de la celata senco)

– homoj malakurate rilatantaj al la marksismo -> homoj nur supraĵe rilatantaj al la marksismo

– oni ne devas -> oni devas ne (se la senco tion postulas)

– tro fleksas la bastonon, fleksitan de anarkistoj -> tro uzas la bastonon, uzitan de anarĥiistoj

– propraj nomoj, kiuj aperas ankaŭ ofte en aliaj marksismaj tekstoj, aperas ĉi tie, kiel en tiuj tekstoj, en sia E-a formo: Karlo Markso, Frederiko Engelso; Bismarck -> Bismarko, Feuerbach -> Fojerbaĥo, Louis Blanqui (kun erara elparolo „(elp. Lui Blan)”) -> Ludoviko Blankio, Dühring -> Duringo. La plej

multaj aliaj personnomoj tamen restas ĉi tie en la formo, kiun elektis la tradukintoj.

– romiaj ciferoj per „arabaj”, ekz-e XVIII -> 18.

## *Piednotoj*

Piednotoj sen siglo estas de la tradukintoj (M. Lapin kaj G. Demidjuk kaj eble ankaŭ N. Hohlov), aliaj portas la respektivan siglon.

## *Sigloj*

-lŝr – Lenino: Ŝtato kaj revolucio (librofina librolisto n-ro 50)

-vl – Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS) …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (*http://eo.mondediplo.com)* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro *„Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”*. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: *http://mas-eo.org* enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

**1. – C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

**2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

**3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

**4. – Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

**5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

**6. – Johano Besada: Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

**7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ** -- **Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

**8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

**9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949,** elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

**10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Poitikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano,

MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

**11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

**12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

**13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

**14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

**15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

**16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj.** François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

**17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

**18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuaĵo al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psiĥologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

**19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo**, **Howard Zinn**: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky**: Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum**: La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti**: Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses**: Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet**: Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani**: La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass** : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith**: Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau**: Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith**: Raporto pri du procesoj, **James Petras**: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma**: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada**: La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná**: Historio kiun la amas-komunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, N**adine Gordimer**: La homaro kiel reflekto de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2

-918300-10-6

**20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo**. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-91830

**21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj.** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

**22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2**, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

**23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj**. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marksa antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

**24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj unua ĝis naŭa***, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

**25. – Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5**26.**

**26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

**27. – Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto"**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

**28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

**29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso" ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭece; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj el-germanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

**30. – Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako**, MAS, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

**31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo.** Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

**32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo**, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

**33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

**34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

**35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj deka ĝis dektria***, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

**36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la $CO_2$-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

**37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

**38. – Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

**39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

**40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino**, MAS, 2010,  85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

**41. – Jozefo Ŝlejfŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

**42. – Ivan Efremov: La Horo de Bovo**. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

**43. – Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES**, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

**44. – Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

**45. – Miriam Rodrígues; ALVERA: Desegni la parkon**, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

**46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento?** *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

**47. – Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

**48. – Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

**49.** - **Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la *Wertkritik*.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

**50 – V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

**51. – Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj**. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

**52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo**, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

**53. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina*,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

**54. Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn**, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

**55. Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

**56. Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300.48-9

**57. Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

**58. José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto)**, Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

**59. Ekonomia krizo n-ro 4.** Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

**60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj.** Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

**61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo**; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo"; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

**62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciiĝo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP**, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

**63. Lode Van de Velde: Epizodoj**, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

**64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro**, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

**65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

**66. Roberto Ŝtejgervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

**67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo.** Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

**68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

**69. Kien la klimato? N-ro 2**, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

**70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

**71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj**, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

**72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p, ISBN 978-2-918300-64-9

**73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietingter: La miskompreno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

**74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

**75. Georgo Fulberto: „La kapitalo" koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

**76. Ivan Efremov: Tais el Ateno.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

**77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»", MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

**78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto.** MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

**79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo.** 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

**80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo.** (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

**81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro.** Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

**82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton**, Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

**83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

**84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj**. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

**85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo.** Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

**86. Franco Kafko: Letero al la patro.** Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

**87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

**88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

**89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

**90. Roberto Ŝtejgervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8

**91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

**92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895)**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2

**93. Máté Zalka: Doberdo. Romano** tradukita el la hungara de János Petik, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

**94. Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko.** Artikoloj tradukitaj de Norberto Díaz Guevara kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

**95. Bartolomeo Laskaso: Raporto pri la detruado de Indio, kun Hans' Magno En-**

**censbergo: Retrorigardo en la estontecon**. Tradukitaj el la hispana de Ludoviko Serrano Pérez kaj el la germana de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 107 p., ISBN 978-2-918300-66-3

**96. V. Adoratskij: Kio estas marksismo kaj leninismo.** El la rusa lingvo tradukis F. Robiĉek, lingve kontrolis E. Drezen. Reeldono de la verko aperinta ĉe EKRELO laŭ vortrekona skano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 34 p., ISBN 978-2-918300-92-2

**97. Lenino: Pri religio. Du artikoloj. Socialismo kaj religio**, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk; **Pri rilato de laborista partio al religio**, trad. G. Demidjuk, laŭ la eldono de [s.n.] Moskvo, 1929, redaktitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-96-0 (tiu ĉi libro)

Lenino: Pri religio. Du artikoloj.

Socialismo kaj religio, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk;
Pri rilato de laborista partio al religio, trad. G. Demidjuk
redaktitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-96-0

Enpaĝigita de MAS per LibreOffice 3.4.3 kaj litertiparo Liberation Serif 10,5 kaj 10 pt sub Mandriva Linukso 2011

Presita en Germanio en la jaro 2013